esploroj de plumbaj akumulatoroj. Kaj la skipo de akademiano *Pavlov* eksportas konstante superajn teĥnologiojn, menditajn de gvidaj firmaoj en la mondo.

En la lastaj 10 jaroj la ĉirkaŭ 60 sciencistoj en la Instituto laboras laŭ kontraktoj kun pli ol 120 sciencaj kaj negocaj partneroj el 32 landoj (Germanio, Britio, Svislando, Svedio, Francio, Italio, Hispanio, Finnlando, Usono, Kanado k.a.). Nur en tiu ĉi jaro la kontraktoj estas 44. Inter ili, 13 estas kun fonduso "Sciencaj esploroj de la Ministerio pri Klerigo kaj Scienco", 3 estas kun bulgaraj firmaoj, pliaj 3 kun grandaj internaciaj kompanioj en Usono.

En la "Kvina kadra programo de EU pri Scienco" 2003-2006 la Instituto gajnis malfacilan eŭropan konkurson kaj fariĝis en Bulgario unu el la 11 tiel nomataj *Centres of Excelence* (Centroj por supera scienco, instruado de junaj sciencistoj kaj disvastigo de konoj), financataj de la Eŭrokomisiono. La Centro estas por esploroj en la kampo de la transporteblaj kaj priaviadilaj energi-fontoj – t.e. akumulatoroj kaj baterioj. Enkadre de la projekto estis trejnitaj 12 junaj sciencistoj kaj ankoraŭ tiom da doktoriĝontoj – po 6 el Bulgario kaj el eksterlando.

Per specialaj zink-aeraj baterioj, kreitaj en IEES, estas ŝargata la aparataro de la bulgaraj ekspedicioj sur *Lhotce*, Everesto kaj Anapurno. Zink-aeraj baterioj de la Instituto jam 10 jarojn funkcias seninterrompe en Balta maro. Por malfacilaj laborkondiĉoj estas destinitaj la liti-aeraj baterioj de IEES.

**Adreso de la aŭtoro**
*Dimitar HAĜIEV*
*Kompleks "Javarov", Blok 4, ap. 14*
*BG – 1124 S o f i a*
BULGARIO
<dimitur_hadjiev@yahoo.com>

**Priaŭtora informo**

La aŭtoro studis juron kaj oficis kiel diplomato de 1950 ĝis sia emeritiĝo en 1987 kadre de la bulgara Ministerio pri Eksteraj Aferoj. Li deĵoris 17 jarojn eksterlande en kvar landoj: Ĉeĥoslovakio, Usono, Tzanzanio kaj Aŭstralio.



## Recenzo

Rezenzo pri la libro

**"La dialogaj teknologioj de civila edukado"**

de *I. A. Poluŝkin, V. K. Miĥelkeviĉ & V. I. Ionesov*

(Scienca Centro de Rusia Akademio de Sciencoj, *Samara*, 2004, 174 p.)

Karaj legantoj, ĉu vi ofte komunikas kun nuntempaj sciencistoj-teoriuloj, kiuj okupiĝas pri la plej modernaj formoj kaj sistemoj de mezlerneja edukado? Antaŭ mi kuŝas unu el la plej novaj monografioj, kies aŭtoroj pritraktas la sciencajn fundamentojn de la projektado kaj realigado de la dialogaj rimedoj de mezlerneja edukado kaj formiĝo de civila respondeco inter lernantoj. Ĝi estas direktita al la instruistoj kaj direktoroj de mezaj lernejoj, liceoj kaj al la postuniversitataj studentoj, profesoroj de superaj klerigaj institucioj. La aŭtoroj akcentas en sia 174-paĝa monografio, ke la dialogo estas la plej aktiva rimedo dum konstruado de kompleksaj sistemoj de homaj rilatoj en ĉiuj sferoj de la socia vivo. La dialogo havas specifan rolon en la formiĝo de homa vivo-agado, kaj la sukceso de klerigado dependas de la dialoga kulturo.

La monografio havas du ĉapitrojn:

– Teoriaj-metodaj bazoj de la dialogo kaj ties teknologio dum instruado en la civila klerigado;

– Projektado kaj realiĝo de dialogaj teknologioj en civila edukado.

Krom tio, la libro havas abundan bibliografian liston (120 librofontojn) de la uzita literaturo. Tiun ĉi ruslingvan libron la aŭtoroj eldonis sub prizorgo de la Samara Scienca Centro de la Rusia Akademio de Sciencoj, Regiona Lingvistika Centro "Dialogo de Kulturoj" kaj Asociiĝinta UNESKO-lernejo (gimnazio n-ro 11 en la urbo *Samara*).

En la unua ĉapitro, krom komunaj klarigoj pri dialoga komunikado kaj teknologio de kleriĝo, la aŭtoroj sperte evoluigas konkretajn formojn de dialogo en la nuntempaj lernejaj situacioj: dialogoj "instruisto-lernanto", "lernanto-lernanto", "lernanto-komputilo", "lernanto-interreto". Dum aplikado de la plej diversaj teknologioj, metodoj kaj rimedoj de edukado, tamen la centra kaj plej grava restas la aktiva,

kreiva dialogo inter instruisto kaj lernanto. La aŭtoroj evoluigas multajn flankojn de tiu ĉi procezo kaj akcentas la gravan rolon de perfektiĝo flanke de la instruisto. Samtempe oni pridiskutas la multkulturan dialogon kiel rimedon de formiĝo de pacema, tolerema kaj senperforta rilato de la lernantoj al la mondo.

Plialtiĝon de la efiko en la funkciado de dialoga teknologio dum la pedagogia procezo oni vidas en la transformiĝo de ĉiuj komponantoj (celoj, enhavo, metodo, rimedoj) en nekontraŭdira, komuna kaj integra sistemo. Tio koncentriĝas en anticipa detala projektado por la lernantoj kaj pedagogoj. Ĉi tie gravas la teoria evoluo de la pedagogia teknologio – senĉesa, logika kaj sinsekva movado de inter si ligitaj komponantoj, etapoj kaj statoj de la pedagogia proceso kaj agoj de la partoprenantoj. En la unua ĉapitro ĉeestas ankaŭ diskutaj elementoj pri la barieroj en la pedagogia proceso kaj la metodoj de ilia eliminado.

En la dua ĉapitro oni diskutas la uzadon de la dialogaj teknologioj en objektivaj sferoj de scioj, en dulingva instruado, aspektoj de administrado de pedagogiaj integriĝoj inter landaj kaj eksterlandaj lernejoj, universitatoj kaj internaciaj organizaĵoj. Tie ĉi estas ankaŭ menciita la preparado de instruistoj al dialoga kleriĝo kaj edukado de lernantoj. Oni esploris la efikecon de dialoga instruado kaj multkultura edukado.

La projektado kaj realigado de dialogaj teknologioj en civila klerigado estis ekzamenita en la gimnazio n-ro 11 de la urbo Samara, asociiĝinta lernejo de UNESKO kaj ĝi fariĝis objekto, kie oni aprobis kaj esploris la efikecon de novaj konceptoj en la pedagogia procezo.

La libro estas bone eldonita kaj, escepte de iuj preseraroj, ĝi enhavas abundan teorian kaj praktikan materialon, science kaj kreive ellaboritan. La moderna kaj ofte uzata faka terminologio ne vualas la sencon de la priskribo, kiu estas bone akceptebla kaj utila, ĉar ĝi estas ankaŭ elemento de la teorie-science fruktodona laboro de la aŭtoroj. La libro sendube estas aktuala por la lerneja intruistaro, edukaj instancoj kaj pedagogoj – nur bezonas esperantigon.

*D-ro Vladimir SĈOTKIN*
*Beruni Strato 31/50*
*UZ – 703050 – Samarkand*
UZBEKIO
<holikmam@mail.ru>



## *Legantoleteroj*

Estimata sinjoro redaktoro de *Scienca Revuo*,

La apudan artikolon, reago al artikolo aperinta en "Heroldo", mi sendis al "Heroldo" jam antaŭ ses monatoj, sed ties redakcio ne aperigis ĝin, pro kialoj al mi ne konataj. Do, se vi konsideras mian reagon aperigebla, bv. aperigi ĝin en via Revuo.

Antaŭdankas via *O. F. Bociort*

## Ĝardeno en kiu kantas unu sola birdo

– Mi samopinias kun d-ro *Renato Corsetti* –

En la artikolo "Ties vizio ne estas la mia" (HEROLDO 3/2008) la aŭtoro, merita iama esperantlingva ĵurnalisto, neas la aserton de d-ro *Corsetti* (fakte konatan veraĵon), ke Esperanto kapablas savi etnajn lingvojn kontraŭ malapero. Tiu ĉi relative nova erariga kontraŭesperanta "vizio" en "Heroldo" postulas atentan analizon. Jen nur kelkaj kritikaj rimarkoj pri la esencaj ideoj de la artikolo:

1. "… sed kio rajtigas supozi, ke Esperanto, se oni vaste uzus ĝin en la internaciaj rilatoj, ne kondutus same kiel la nunaj tutmonde plej fortaj lingvoj?"

a) Rajtigas la tiel nomata *laŭmodela pensado*, t.e. aparta hipotezo estas atentinda se pravas la *ĝenerala principo,* sur kiu ĝi baziĝas. Ĉi-kaze la principo estas: la internaciaj, neŭtralaj strukturoj (UNO, Ruĝa Kruco k.a.) ne endanĝerigas la naciajn strukturojn; tion faras nur etnaj, hegemoniaj strukturoj. Kontraŭ la jam videblaj negativaj influoj de la angla lingvo, aperis reagoj en kelkaj landoj, defende al propraj lingvoj.

b) Ne ekzistas propra "konduto" de lingvoj, ĉar, sen la homa ago, ili ne estas kibernetikaj sistemoj. La latino, **kiel lingvo de antikva imperio**, detruis la lingvojn de konkeritaj dakoj, galloj k.a., sed dum la mezepoko, kiel simpla ilo por humanistoj, **do lingvo sen ŝtato**, ĝi malutilis al neniu etna lingvo.